



2(175)
2020

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Julia Hartwig

trad. Lidia Ligęza

Wiersz zapomniany

Uwielbić własną młodość
ten wyraz zapamiętałości w powadze
że jakieś przyrzeczenie jakaś pewność
się spełni
Wspaniała gładka skóra otwarty umysł
ciekawość niewiadomego
i pewność że nam ono przypadnie

Skąd ta duma
skąd ta czułość dla świata
i to oddalenie które daje siłę
Wszystko przewidziane
żadnego zaskoczenia bólem
Jeżeli smutek – a jest – to jak mgła
To co trwa niknie w niej tylko z pozoru
Odwołana gra
Ile wytrzymasz
ile potrafisz nie zdobyć ale odrzucić

Z tomu
Gorzkie żale
Kraków, 2011

La forgesita poemo

Adori la propan junecon
ĉi fenomenon de la fanatikeco en seriozo
ke iu promeso iu certeco
plenumiĝos
Splenda glata haŭto perta menso
sciemo pri nekonato
kaj certo ke tio al ni trafos

De kio ĉi fiero
de kio ĉi sentemo por la mondo
kaj ĉi forigo kiu donas forton
Ĉio antaŭvidita
nenia surprizo pro doloro
Se tristo – kaj ĝi estas – nur kiel nebulo
Tio kio daŭras malaperas en ĝi nur ŝajne
Nuligita ludo
Kiom da vi eltenos
kiom da vi scipovas ne gajni sed malaprobi

El poemvolumo
Galaj plendoj
Krakovo 2011

Ŝranko

Kiam ni ĉi tie enloĝigis, ni aĉetis Ŝrankon. Ĝi estis malhela, malnova kaj kostis pli malmulte ol transporto de ĝi el komisia vendejo al la hejmo. Ĝi havis du pordojn ornamitajn per planta motio kaj la tria estis vitrumita kaj en vitro respeguliĝis la tuta urbo, kiam ni transportis ĝin per la luita pakajaŭto. Oni devis ligi ĝin per ŝnuro, por ke ĝi ne apertu dum vojaĝo. Tiam unuan fojon, starante ĉe ĝi kun tiu nodita ŝnuro, mi havis esprimon de la propra absurdeco. – Ĝi konvenos al niaj mebloj – diris R. kaj senteme manglatis ĝian lignin korpon, entute kiel bovinon, kiun oni acetal por la nova mastrumo.

Komence ni starigis ĝin en koridoro – ĝi devis esti kvaranteno antaŭ eniri en la mondon de nia dormoĉambro. Mi injektis en apenaŭ videblajn truetojn terebintoleon, ĉi neerarigan vakcinon kontraŭ eroj de la tempo. Nokte la Ŝranko, transstarigita en novan lokon ĝemis per knaro. Lamentis mortantaj skolitoj.

Dum venontaj tagoj ni ordigis nian novan malnovan loĝejon. En fendo de la flanko mi trovis enpuŝitan forkon kun gravurita sur premilo svastiko. El post ligna tegaĵo elstaris restaĵojn de fuzita gazeto kaj ĝuste rekonebla estis nur unu vorto: „proletoj”. R. apertadis vaste fenestrojn, por pendigi kurtenojn, kaj tiam enfaladis en la ĉambron bruoj de ministaj orkestroj, kiuj treniĝis tra la urbo ĝis vespero. Dum unua nokto, kiam la Ŝranko fariĝis partoprenanto de niaj sonĝoj, ni ne povis longe ekdormi. La mano de R. sendorme vagis tra mia ventro. Kaj poste ni havis sonĝon. De tiu tempo ĉiam ni havadas komunajn sonĝojn. Ni sonĝis pri la absoluta silento kaj ke ĉio estis en ĝi pendigita kiel dekoraĵoj en vitrinoj de la butikoj, kaj ke ni estis en ĉi silento feliĉaj, ĉar estis ĉie malestantoj. Matene ni entute ne devis al ni rakonti ĉi tiun sonĝon – sufiĉis nur unu vorto. Kaj de tiu tempo ni ne rakontas al ni la sonĝojn. Iun tagon okazis, ke nenio estas por labori en nia loĝejo. Ĉio staris sur la propra loko, purigita kaj ordigita. Mi varmigis la dorson ĉe forno kaj rigardis telertukojn. En ilia fadena desegno ne estis tamen ordo. Iu per kroĉetilo faris truojn en daŭro de materialo. Trans ĉi truetoj mi ekrigardis la Ŝrankon kaj rememoriĝis al mi tiama sonĝo. De ĝi fluis ĉi silento. Ni staris vid-al-vide kaj ĝuste mi estis tio, kio fragila, moviĝema kaj maldaŭra. Ĝi konstituis simple sin mem. Perfekte ĝi estis tio, kio estas. Mi tuŝis per la fingro elglititan globanson kaj la Ŝranko apertis antaŭ mi. Mi ekvidis ombrojn de siaj roboj kaj du trivitaj garnituroj de R. – ĉio havis en tenebro la saman koloron. En la Ŝranko per nenio diferenciĝis mia virineco ol vireco de R. Havia ankaŭ nenian signifon, ĉu io estas glata aŭ raspa, ovala aŭ randa, malproksima aŭ proksima, fremda aŭ propra. Ekodoris de tie per aliaj lokoj kaj per tempo, kiu estis por mi fremda. Dio, kaj tamen ion ĝi rememorigis, ion tiel konatan, tiel proksiman, ke ne sufiĉus vortojn, por tion nomi (vortoj bezonas ja distancon por nomi). Mia persono trafis en atingopovon de spegulo sur la ena flanko de la pordo. Mi respeguliĝis en ĝi kiel malhela formo, apenaŭ diferenca de robo pendanta sur vestarko. Ne estis diferenco inter viva kaj malviva. Tio do mi estis en unu spegula okulo de la Ŝranko. Nun nur sufiĉis levi la pieron kaj eniri enen. Mi faris tion. Mi eksidis sur reklamsakoj kun trikfadeno kaj ekaŭdis fortigitan per fermita spaco sian propran spiron.

Kiam la menso restas sen atestantoj, kun si mem, komencas preĝi. Ĉar tia estas naturo de la menso. „Anĝelo dia, gardanto mia” – mi ekvidis mian gardanĝelon kun la vizaĝo tiel bela, ke ĝi

devis esti morta, „vi ĉiam ĉe mi staru...” – liaj vaksitaj flugiloj ampleksas ame spacon ĉirkaŭ mi. „Matene” – aromo de kafo kaj helaj fenestroj vundantaj dormemen vidon, „vespere” – lantiĝanta tempo, kiam sunsubiras, „tage”, – esto fariĝas la sama kiel spertado, bruo, movo, miliono da agoj sen signifo, „nokte” – inerta, soleca en tenebro korpo, „estu al mi ĉiam helpema” – anĝelo gardanta infanojn, kiuj iras super abismo. „Gardu, defendu mian animon kaj korpon mian” – kartonaj skatoj kun surskribo ATENTEME, FRAGILA, „kaj alkonduku min al la vivo eterna, amen” – pendantaj en duonkrepusko de la Ŝranko roboj.

Kaj de tiam ĉiutage la Ŝranko entiradis min en sin, estis granda funelo en nia dormoĉambro. Komence mi sidadis en ĝi dum malfruaj posttagmezoj, kiam R. ne estis hejme. Poste mi faris matene nur la plej bezonatajn aĵojn, aceton, lavadojn, iun telefonon kaj eniradis en la Ŝrankon mallaŭte fermante la pordon post si. Ene ne gravis, kia estas tempo de la tago, kia jarsezono, kia jaro. Ĉiam estis velure. Mi nutris min per la propra spiro.

Iam mi vekigis nokte de iu sonĝo, peza kiel sufoka aero, kaj mi avidis la Ŝrankon kiel viron. Mi devis impliki la manojn kaj la piedojn kun la korpo de R., mi devis teni lin spasme, por povi resti. R. parolis dumdorme, sed liaj vortoj estis sensencaj. Kaj fine iun nokton mi vekis lin. Li ne volis eliri el varma lito. Mi ektiris lin post si kaj ni ekstaris antaŭ la Ŝranko. Ĝi estis senŝanĝa, potenca kaj alloga. Mi tuŝis per la fingroj glitan globanson kaj la Ŝranko apertis antaŭ ni. Estis en ĝi sufiĉe da loko por la tuta mondo. Ena spegulo montris nin ambaŭ, malimplikante en tenebro niajn formojn. Niaj spiroj, komence malegalaj kaj disŝiritaj, trovis unu ritmon kaj ne estis inter ni ia diferenco. Ni eksidis en la Ŝranko vid-al-vide. La vizaĝojn kovris al ni pendantaj vestoj. La Ŝranko fermis post ni la pordon. Tiel en ĝi ni ekloĝis.

Komence R. eliradis ien eksteren, iaj aĉetoj, ia laboro. Sed poste ĉi peno fariĝis tro dolora. Tagoj fariĝis pli longaj. El stratoj aŭdebliĝas foje dampita muziko de ministaj orkestroj. La suno malaperas kaj revenas, kaj tiam fenestroj provas senrezulte entiri ĝin enen. Meblojn, telertukojn kaj porcelanon kovras pli kaj pli dika tavolo de polvo kaj nia loĝejo kontinue dronas en tenebro.

tradukis Lidia Ligeza

KABE

Ursa servo

Ermito edukis urson kaj tiel bone ĝin instruis, ke ĝi servis al li kvazaŭ homo. La urso ĉasis por li, portis lignon, gardis la dometon kaj akompanis lin ĉien, kvazaŭ fidela hundo.

Foje, en varmega tago, la ermito dormis sur herbo en la ombro de l' foli-riĉa arbo. Apud li sidis la urso kaj forpelis muŝojn, kiuj amase flugis ĉirkaŭ la maljunulo kaj ne lasis lin trankvila.

Precipe unu muŝo tede atakis lin. Jam kelke da fojoj la urso forpelis ĝin, sed ĝi ĉiam revenis kaj sidiĝante jen sur la orelon, jen sur la vangon, mordis lin. La urso ne povis plu toleri tion kaj kolere ekkriis: „Atendu, tedulo! Vi tuj ĉesos maltrankviligi mian sinjoron!” Dirinte tion, ĝi kliniĝis kaj levinte grandan ŝtonon, tiel lerte ĵetis ĝin, ke ĝi ne sole mortigis la muŝon, sed ankaŭ dispecigis la kranion de l' ermito.

Murtapiŝo

Tiutempe mi okupiĝis pri teksado de murtapiŝo. Unue ili permesis tion. Poste ili komencis primoki, ĉikani min pro tio. Fine eĉ malhelpi. Sed mi ne ĉesis.

Iutage ili diris: ni ne havas manĝaĵojn, iru labori. Mi respondis, ke mi teksas murtapiŝon. Ho, vi vendos ĝin kaj ricevos multe da mono? – demandis ili. Ili ne demandis, sed eĉ asertis tion. Mi ne vendos ĝin, ĉar mi faras ĝin por mi mem – mi respondis – mi volas havi ion bele gan en tiu domo, kiu estos iam la mia. Stultaĵo – ili diris – vi malsatmortos, se vi faras nur tion.

Frumatene mi eliradis al la mar bordo, kaptadis krabon, kaptadis kaj portis ilin al vendoplaĉo. Mi vendis ilin por malmulte da mono kaj tiom sufiĉis por unu tago. Kiam la suno leviĝis alten, en ombro mi teksis plu la murtapiŝon.

Mi enteksis multajn kolorojn – ĝi fariĝis ĉiam pli bela. Ĝi prezentis unusolan, grandan floron – mi nomis ĝin floro de la Suno. Oranĝflava, trairanta el fajroblanka al sunkolora, etendataj flabrakoj, radiantaj petaloj. Kaj ruĝa fono.

Miaj fratinoj ĉiuvespere staradis sur stratanguloj. Miaj fratoj forveturis ien per fiŝkaptistaj barkoj.

Mi teksis la murtapiŝon.

Mia patrino mortis, la rigardo de mia patro fariĝis nenion-vidanta; tuttage li ridetis, ridaĉis.

Mi teksis la murtapiŝon.

Unu el miaj fratinoj mortigis sin, la alia malaperis. Nian domon iunokte trafis fulmo, ĝi bruliĝis. Mi elsavis la murtapiŝon, mia patro mortbrulis interne.

Mi teksis.

Nur la vento restis mia malamiko. Mi si dis sur alta roko, la vento forŝiradis la fadenon el miaj manoj. Sed antaŭ ol ĝi ventis, la murtapiŝo pretiĝis.

Belega ĝi estis. Mi admiris ĝin.

Neniun mi havis, al kiu mi povus montri ĝin.

Tamen, ĝi treege plaĉis al mi.

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj 2020 j.

- 9. 01. 2020 j. – Kluba renkonto ĉe oblato kaj esperantaj kantikoj.
- 16. 01. 2020 j. – Lidia Ligęza. Traduk-ekzercoj helpe de fabeloj de Charles Perrault.
- 23. 01. 2020 j. – Grażyna Porada. Esperantaj lingvaj ludoj.
- 30. 01. 2020 j. – Marta Michałowska. Spritaĵoj laŭ germana maniero.

- 6. 02. 2020 j. – Grażyna Porada. Esperantaj lingvaj ludoj.
- 13. 02. 2020 j. – Adam Wilkus. Fot-impresoj el Beskidoj. Komputila prezento.
- 20. 02. 2020 j. – Lidia Ligęza. Pollingva renkonto kun interesitoj pri Esperanto: „Język esperanto – próba porozumienia między narodami.”